

ILEI subtenas Esperanto-Sumoon !

Legi libron, librojn, estas bonega maniero plilertighi, bone lerni nian lingvon.

La programo ESPERNANTO-SUMOO estas elstara kampanjo lanchita de HORI Yasuo, emerita instruisto. ILEI subtenas morale tiun agadon.

Partoprenu ankaŭ VI !

La novembra SUMOO komenciĝas hodiaŭ 9an de novembro.

Mi mem komencas !

Kun elkoraj salutoj

Mireille Grosjean, prez de ILEI

Invito al Esperanto-Sumoo

HORI Yasuo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Okaze de tiuj konkursoj mi proponas al vi partoprenon en Esperanto-Sumoo.

Vizitu nian TTT-ejon por pli detale scii, kio estas nia sumoo: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

1. Celo:

Legi Esperanto-librojn kun ĝojo

2. Luktmaniero:

- 1) Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
- 2) Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo.
- 3) Laŭ la irado de vera Sumoo-konkurso, ni luktadas. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj ĝis la noktomezo de tiu tago, vi venkas, se ne, vi malvenkas. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

3. Aliĝo:

Sendu jenajn informojn al HORI Jasuo: horizon@water.sannet.ne.jp

- 1) Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso
- 2) Via luktista nomo
- 3) Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kiom da paĝoj vi legos

4. Raportu vian rezulton

Kiam komenciĝos la Sumoo, ĉiun duan aŭ trian tagon (ne nepre) raportu al la prizorgantoj pri via venko aŭ malvenko. Ili notos ĝin kaj resendos al vi la raportaron kun rezultoj de aliaj luktistoj.

Mi atendas vian partoprenon. Ne nur vi sed ankaŭ viaj libroj kuŝantaj en la breto havos tre feliĉajn tagojn en tiu sumoo.

HORI Jasuo (s-ro)

2-13-3 Ootone, Maebasi, Gunma 371-0825 Japanio

Legu pli en IPR 2014 4 kaj sur la retejo de ILEI www.ilei.info